**N I A  V O Ĉ O**

**Madrida Esperanto-Liceo**

San Alejandro 6-4ºB-Ext. 28005 Madrid

(Nur poŝta adreso)

Ni kunvenas lunde je la 18,30 en Rodríguez San Pedro 13-3º-7

Redaktas kaj eraras: Lupe Sanz **JUNIO 2001**

Nia Voĉo estas legebla en internet ĉe la TTT-paĝo de Andaluzia Esperanto Unuiĝo:
http://www.ciudadfutura.com/esperanto

**HISPANIO**

La **Centro de Unesco del País Vasco** premiis "Esperanto"-Radikalan Asocion pro ĝia rimarkinda kontribuo al la redaktado de la Monda Raporto pri la Lingvoj". Tiu raporto konsistas el la unua kompleta kaj oficiala studaĵo pri la sanstato de ĉiuj lingvoj ankoraŭ parolataj en la mondo.

**UEA**

Denove UEA estis proponita kiel **kandidato al Pacpremio de Nobel**. Apogis la kandidatecon membroj de registraroj aŭ parlamentoj almenaŭ de Francio, Koreio, Kroatio kaj Litovio kaj universitataj profesoroj de kelkaj landoj, inter ili Rafaela Urueña kiel Profesorino pri Internacia Juro de la Universitato de Valladolido (Hispanio).
UEA, kiel asocio en **konsultaj rilatoj kun UNICEF** ekde 1993, subskribis dokumenton pri la realigo de infanaj rajtoj en la UN sed ĝi atentigis pri tre grava manko en ĝi, nome ne-mencio de la rajto de la infanoj esti edukataj en la propra denaska lingvo, almenaŭ en elementa nivelo. La fina dokumento inkludis tian mencion.

**ESPERANTO EN AMASKOMUNIKILO**

"ABC 2001-05-04" publikigas artikolon de José Infante laŭ la titolo Esperanto. Temas pri lia apogo al esperanto kaj pri la nova Babel-turo okaze la la naciaj lingvoj en Hispanio.
La revuo "Caminos & viajeros" de la vojaĝ-entrepreno Alsa-Enatcar, dediĉas en la numero de januaro-2001 dupaĝan artikolon sub la titolo "La lengua de nadie para todos". Buntaj fotoj prezentas plaĉan bildon de nia movado kaj aparte reliefigas la valoron de Pasporta Servo.
En la inform-bulteno de la entrepreno "Empresarios Agrupados" aperis artikolo pri la aŭtomata tradukado kun fotografaĵo de la stando de Esperanto en Expolingua kaj la ttt-paĝo de HEF.

**ESPERANTO EN "INTERNET"**

Aperis 2ª pliampleksigita eldono de vaska-esperanta retvortaro
//esperanto.online.fr/esperanto64/euskau0.htm
La ĉina peranto de IKEF (Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo) gvidas retejon pri ekonomio kaj komerco www.komerco.com
La Internacia Esperanto-Muzeo de la Aŭstra Nacia Biblioketo kiu posedas la plej grandan planlingvan bibliotekon havas sian katalogon en la reto www.onb.ac.at/sammlgn/safr.htm

**2001 EŬROPA JARO DE LA LINGVOJ**

La plej grava esperanto evento estas ĝis nun la partopreno de esperantista grupo da junuloj en la tago de Euroscola, ĉe la Eŭropa Parlamento de Strasburgo. Partoprenis 17 delegacioj: po unu por ĉiu oficiala membro-stato (malpli Britio), krome de Pollando kaj de Esperantio. La esperantista delegacio dividiĝis inter la amfiteatro (35) kaj la tribuno, kie proksimume 150 pli videble montriĝantaj kaj aŭdeble sciigantaj sian esperantecon inter la spektantoj. Bedaŭrinde estis sendebata debato, kun unudirkta parolado de entute 25/30 oratoroj, inter ili 3 esperantistoj.

Inter aliaj, la teksto preparita de la “Esperantista Grupo” petas al la Eûropuniaj instancoj “*starigi intergrupan spoecifan komisionon por studi la problemon de la eûropaj lingvoj kaj alporti solvon por la protektado de toes diverseco kaj kontraû risko de hegemonio de iu nacia lingvo. La komisiono ekzamenus, kune kun esperanto.praktikantoj, la eblecon agnoski kaj oficialigi la internacian lingvon esperanton, kiel neutralan helpilon de rekta ĉiucela interkomunikado, kaj kiel propedeûtikan akcelilon por lernado defremdaj lingvoj*”.

Se vi deziras ricevi informojn pri la agado de Eûropa Esperanto-Unio petu al u.broccatelli@libero.it



22-30 junio 60-a Kongreso de Hispana Esperanto-Federacio

| Poŝta Adreso | Telefonoj | Elektronika poŝto |
|---|---|---|
| Coronel Fernández Tudela 65. | 968 570 603 | vsa10001@almez.pntic.mec.es |
| 30730 San Javier (Murcia) | 968 183 338 | |
| | 968 190 588 | |

Pli da informoj en jenaj TTT-aĝoj
www.60kongreso.50megs.com
http://almez.pntic.mec.es/vsa10001

## REELDONO DE "Nuevo método de esperanto"

Pro diversaj kialoj (flanke de la eldonisto, ne de MEL) la eldono de la metodo de F. De Diego prokrastiĝis sed finfine Gram Ediciones komunikis al Madrida Esperanto-Liceo ke por la venonta kongreso de San Javier la libro estos preta. Ĝi estos ero de la kolekto de lingvo-metodoj kiujn regule eldonas la eldonejo, faka pri lingvoj. La libro baziĝas sur la eldono de 1992, farita de Heroldo de Esperanto, kun aktualigitaj datumoj kaj korektaĵoj.

## LIBROSERVO FINIĜAS

Ekde 1985 Luis Hernández zorgis pri Libroservo, li okupiĝis pri la vendado de esperantaj libroj eldonitaj en Hispanio kaj aĉeteblaj pere de la stoko de UEA. La modernaj teknologioj kaj la alveno de la eûro demandas aliajn metodojn por la aĉetado de libroj kaj por tio Luis ne deziras pludaûrigi sian servon. Ĝis la fino de la jaro li daûrigos plenumante la ricevotajn mendojn, nur de libroj ekzistantaj en stoko je bona prezo. Se iu grupo deziras daûrigi la servon (sendependa de HEF) li povas sendi proponon.

## VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO

Ni kunvenas, lunde ekde la 18.30 h en RODRÍGUEZ SAN PEDRO 13-3º-7 Tel. 91 446 80 79.

Prelegoj:
18-an de junio "Sicilia, filma insulo". Lumbildoj

Juan del Castillo gvidas paroladon vendrede je la sesa en la teraso “El Embarcadero” de la lago de Casa de Campo (Metroo Lago)

..............................................................................................................................

**ESPERANTO LICEO DE MADRID**
**San Alejandro 6-4ºB. Ext**